






№ 05
1965

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviista



B O N D E Z I R O J

OKAZE DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, KUN VARMA KORO, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO KAJ LA REDAKCIO DE "ITALA FERVOJISTO", FRATE BONDEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO. NI SENDAS KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

C O M U N I C A T O

Col Congresso Nazionale della "Itala Fervojoista Esperanto-Asocio" tenutosi il 19 settembre 1965-a Rimini, nel quadro del 36° Congresso Italiano di Esperanto, si é aperto il nuovo anno finanziario 1965-66.

Preghiamo vivamente i nostri Soci di versare le quote al piú presto.

Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega al presente bollettino, il modulo di versamento nel C.C.Postale n° 8/24094 intestato all'I.F.E.A. Via Donato Creti, 61 BOLOGNA.

Le quote sociali per l'anno 1966 sono le seguenti:

- Associazione all'I.F.E.A., all'I.F.E.F., all'U.E.A. e alla F.E.I. con abbonamento alla rivista "L'Esperanto": £. 2,500,- annue.
- Associazione solamente all'I.F.E.A. ed all'I.F.E.F. (per quei Soci che pagano le quote di associazione alla FEI ed all'UEA direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): £. 1.000,- annue.

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per l'anno 1965 e continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote 1965 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti oppure trasmettere le loro dimissioni per non dover pagare le loro quote anche per l'anno 1966 alle suddette Associazioni.

UNIVERSALA KONGRESO EN BUDAPEŝTO

Post la bonsukcesa kaj ĝis nun plej granda Fervojoista Esperanto-Kongreso okazinta en Budapeŝto en la jaro 1962 naskiĝis la ideo inviti kaj aranĝi denove Universalan Kongreson en la Hungara ĉefurbo. La respektivaj instancoj montris komprenemon por la plano kaj la faritaj klopodoj havis sukceson ĉar la Hungara Registaro per dekreto rajtigis la Hungaran Esperanto-Asocion inviti la 51-an UNIVERSALAN KONGRESON DE ESPERANTO al Budapeŝto por la jaro 1966, de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto.

La nova estraro de la Universala Esperanto-Asocio elektita en Hago akceptis la inviton dum sia kunsido kunvokita por la 7-a de aŭgusto.

Ĝi bone motivis la decidon komunikante en sia oficiala organo "Esperanto", ke la hungara ĉefurbo havas tian famon en la historio de la Internacia Lingvo, ke tiu kongreso estos iasence kvazaŭ hejmenreveno, ĉar inter la du mondmilitoj ĝi estis la centro de la Esperanta literaturo, kaj krome en la sama jaro D-ro Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy, la du famaj steloj de la Esperanta literaturo fariĝos 75-jaraj. La Estraro de U.E.A. konsideris la fortan moralan kaj financan subtenon de la hungara registaro, la progresojn de la hungara Esperanto-movado, precipe sur lerneja kampo, la sukcesan 14-an Kongreson de la Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio okazinta en la sama urbo. Jen ĉio ĉi estis la gravaj faktoroj por la favora decido. La unua Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en la gastama Budapeŝto, estis la 21-a kun 1200 partoprenantoj en la jaro 1929.

Dum la kongreso okazos ankaŭ speciala fervojoista tago kun bela, varia programo kaj tuttaga ekskurso por la fervojistoj partoprenantaj la 51-an Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto.

La Loka Kongresa Komitato kore invitas vin, kaj atendas ĉiun Esperantiston per la fama hungara gastamo! Vi estos almenaŭ unu semajnon partoprenanto en la vivo en Hungario - eĉ pli longe, se vi vizitos la ANTAŬKONGRESAJN TAGOJN EN DEBRECEN kaj la POSTKONGRESAJN TAGOJN EN SZEGED aŭ la KONGRESON DE T.E.J.O. EN PÉCS.

LOKA KONGRESA KOMITATO DE 51-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - BUDAPEST 5, Pf. 193 (Hungario).

ZAMENHOF-PORTRETO EN UDINE

Dank' al larĝvida komprenemo de la ĉi tiea Urbestro S-ro Prof-ro Bruno Cadetto kaj al sia necesa kunhelpo la, dum longaj jaroj forgesita ruĝa memortabulo kun la vere arta portreto el mozaiko de la aŭtoro de Esperanto, fine estis oficiale inaŭgurita sur Udine la Kastelo! La longa, persista klopodado tiurilate ĉe la Urbestro, farita de iama Grupprezidanto librotenisto Armando Blasoni kaj de la nuntempaj Prezidantino Prof-ino Luizino Deganutti kaj Grupsekretario Johano della Savia, fine atingis kontentigan sukceson.

Dimanĉe la 5-an de septembro, kun la favoro de tre bela suna tago, centoj da gesamideanoj sin kolektis sur la plej supra ekstera promenadejo de la Kastelo por ĉeesti la jam de longtempe atenditan eventon.

Krom la Udinea Urbestro, kunvenis S-inoj Sparta Tellini Voltolini kaj Idanna Trevisan respektive filino kaj nepino de la donacinto samideano D-ro Akilo TELLINI; nombro da lokaj gesamideanoj kaj el diversaj italaj urboj, inter kiuj: Bologna (S-ano Germano Gimelli peprezentis la tiean Esperanto-Grupon "Akilo Tellini" kaj la Italan Fervojistano Esperanto-Asocion), Monfalcone, Padova, Rimini, S.Giorgio di Nogaro, Trieste (la plej multenombra grupo), Venezia, Verona, k.a.; el Aŭstrujo ĉeestis S-ano Franz Watzinger el Villach (Karintio); el Jugoslavio alvenis la Prezidanto de Esperanto-Societo de Ljubljana S-ano Tone Logar kune kun S-ano Mizeriĉ Dezideri, kaj alia S-ano el Nova Gorica. S-anoj Logar kaj Mizeriĉ reprezentis la Slovenan Esperanto-Societon de Ljubljana. El Cittadella (Padova) venis al Udine Prof-ro D-ro Dino Fabris, kiel Delegito de U.E.A., reprezentis la Universalan Esperanto-Asocion kaj, plue, la Italan Esperanto-Federacion.

Prof-ro D-ro Dino Fabris, Sekretario de Internacia Societo de Esperantistaj Ĵurnalistoj, estis la oficiala oratoro de la manifestacio kaj li plenumis sian taskon brile, trafe kaj konvinkige. Kiel unua parolanto li salutis kaj dankis la ĉeestantan lokan Urbestron pro la valora helpo donita al la Esperantistaro kaj rememorigis la ne plu vivanta S-anon D-ron Akilo Tellini kiu donace, postlasis al sia urbo tian artaĵon. La parolinto ektuŝis poste diversajn argumentojn koncerne Esperanton kaj ĝian eltrovinton, atentante fine pri la granda homama forto kiu naskas inter la adeptoj de Esperanto kaj invitante ĉiujn larĝvidajn personojn helpi Esperanton, ĝin lernadi, disvastigi kaj uzi ĝin. D-ro Fabris sciigis ankaŭ pri la nuna jaro de Internacia Kunlaborado, kaj pri la, en la tuta mondo, kolektataj subskriboj transdonotaj al O.N.U. por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Responde parolis Prof-ro Bruno Cadetto, Urbestro de Udine kiu, inter alie, informis ke sia urbo jam agas sur internacia kampo kiel ĝemeligita al tri urboj: en Anglujo, Germanujo kaj Francujo.

Post reaj dankoj al la parencoj de D-ro Tellini kaj al geesperantistoj li finis bondezirante prosperon kaj sukceson al la Esperanto-Movado.

Aplaŭdoj kronis anbaŭ paroladojn; same oni aplaŭdis, ĉe la komenco, kiam la memortabulon (kovrita per verda tuko) oni malkovris.

Post komuna fotografado, plurdekoj da gesamideanoj sidis kune en restoracio por la komuna tagmanĝo. La bela, neforgesebla tago finiĝis per ekskurso al apuda surmonteta urbeto Tarĉento, kie ĉiuj disiĝis por reveturi al siaj lokoj.

La Sekretario de la Esperanto-Grupo Udine: Johano della Savia

"FIAT" EN TOKIO

Dum la Tokia Universala Kongreso estis prezentita la filmo en Esperanto de "FIAT" pri la nova veturilo "850". Oficiala delegitino de la granda aŭtomobilfabriko, en FIAT-uniformo, S-ino Ursula Grattapaglia, disdonadis donacetojn al ĉeestantoj (aŭtomobiletoj, vezikbalonoj, infanludiloj, k.s.).

I M I T I N D A E K Z E M P L O

La itala urbo Asti enkondukis Esperanton en siajn bonvenigajn tabulojn. Ĉiuj vojaĝantoj kiu alvenas en Asti povas legi itale kaj esperante bonvenigajn vortojn. Imitinda ekzemplo por aliaj urbestroj!

36-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO EN RIMINI

De la 18-a ĝis la 23-a de septembro okazis en Rimini, la urbo fama kiel "Strando de Eŭropo" sed ankaŭ kiel grava fervoja relkruciĝo, la 36-a Nacia Kongreso de la Italaj Esperantistoj.

La Kongreso, al kiu partoprenis preskaŭ 400 geesperantistoj inter kiuj dudek eksterlandanoj el sep landoj, okazis sub la alta patronado de Lia Moŝto Giuseppe Saragat, Prezidanto de Itala Respubliko.

La solena inaŭguro okazis en la belega salono "de l'Arengo" en la urbo-domo, en la ĉeesto de la Urbestro de Rimini S-ro W.Ceccaroni, kaj kelkaj deputitoj. La Direktoro de Itala Instituto de Esperanto, Prof-ro C.Agostini, deklaris, ke la italaj esperantistoj atendas la decidon de la registaro pri la prezentita leĝpropono n-ro 1816 por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Deputito F.Nicolazzi, unu el la ses parlamentanoj, kiuj prezentis la leĝproponon, sin deklaris kunlaboranto kaj amiko de Esperanto-movado kaj publike petis al Lia Moŝto Angelo Salizzoni, kiel reprezentanto de la Registaro, apogi la komunan agadon ĉe la Ministerio pri Publika Instruado.

La kongresaj aranĝoj inkluzivis i.a; ĝeneralajn kunvenojn de F.E.I. kaj fakajn kunsidojn de instruistoj (kiuj i.a. decidis starigi jaran studsemajnon por geinstruistoj), katolikoj, fervojistoj kaj junularo.

Dum la solena inaŭguro S-ro G.Gimelli Sekretario de IFEA portis la saluton de la Fervojista Esperantistaro kiu estas en la unua vico en la disvastiĝo de Internacia Lingvo. Vicministro A.Salizzoni kaj Deputito F.Nicolazzi dum siaj paroladoj substrekis la taŭgecon de esperanto per jenaj vortoj "Ni deziras ke Esperanto fariĝu la lingvo de niaj fervojistoj kiuj ĉiutage havas eksterlandajn renkontojn".

En la preĝejo de S.Bernardino, Pastro Albino Ciccanti celebris, por la unua fojo en Italujo, la tutan Meson en Esperanto.

Okazis ankaŭ vizito al Ravenna, kie en salono "Dante Alighieri" de la "Biblioteca Classense" Prof-ino Clelia Conterno prelegis pri "Dante kaj la itala lingvo; Zamenhof kaj la internacia lingvo" kaj S-ro N.RYTJKOV deklamis erojn de la "Infero" de Dante en la traduko de la hungara poeto K.Kolocsay. Sekvis omaĝo al la tombo de Dante. La Urbestro de Ravenna, Prof-ro B.Benelli, kiu ĉeestis la prelegon pri Dante kaj al kiu oni donacis "La Dia Komedio"-n, akceptis la kongresanaron en la urbodomo.

Ĵaŭdon la gekongresanoj ekskursis al San Marino, la plej antikva respubliko en la mondo. Adv. A.Barbiellini, Prezidanto de F.E.I. donacis al Adv. L.Lonfernini, Deputito pri la Ŝtata turismo, ekzempleron de "La Dia Komedio" kaj ricevis interŝanĝe arĝentan pladon.

La kongreso akceptis rezolucion, kiu i.a. rekomendas al ĉiuj organizaĵoj de Italujo doni sian konkretan favoran aprobon al la prezentita leĝpropono.

Dum la adiaŭa vespero, Inĝ. Caraffa, en la nomo de F.E.I., donacis al la Prezidanto de la Turisma Instanco de Rimini, Inĝ. Luciano Gorini, ekzempleron de "La Dia Komedio" kaj ricevis pokalon kun jena surskribo.. "al F.E.I. pro ĝia agado por alproksimigi la popolojn".

CEREMONIO ĈE LICEO "MAFFEI" DE VERONA OKAZE DE LA DISDONO DE LA
DIPLOMOJ DE INTERNACIA LINGVO

Dimanĉon 31/10 ĉe "aula magna" de la ŝtata liceo "MAFFEI" estis disdonataj la diplomoj al la lernantoj de la kursoj de Esperanto. La liceestro Prof. Laita, ĉeestis kiel oficiala reprezentanto de "Provveditore", la plej alta lerneja aŭtoritato en la Verona Provinco. Prof. Laita esprimis estimon por la agado de la Verona Grupo kaj bondezirojn por la realiĝo de la celoj de la Movado. Oni regalis lin per kopio de "La Dia Komedio", kiun li aparte ŝatis.

Grafo Fontanive, nia ŝatata Honora Membro, tiucele alveninta el Romo, portis la saluton de "Sendependa Kultura Movado" kaj de la Romaj esperantistoj kaj informis pri la lastaj atingoj de la Internacia Lingvo en la ĉefurbo.

Post li, Prof.Spadafora, kiu estras en Verona la "Instituton por Kulturaj interŝanĝoj kun eksterlando", parolis pri siaj spertoj kiel lingvisto kaj kiel organizanto de kursoj kaj vojaĝoj, ĉefe en la kadro de ĝemeliĝoj de Verona kun fremdaj urboj. Li finis sian diron substrekante la utilecon de neŭtra la lingvo en la internaciaj rilatoj kaj -pruve de la simpleco de Esperanto-

li sin turnis en tiu lingvo al multnombra neesperantista publiko invitante ĝin al ties lernado; tiun inviton la publiko komprenis kaj kore aplaudis.

Fine Prof. Fabris de Itala Esperanto-Instituto, faris oficialan paroladon pri la temo "Aktualeco de Esperanto". Li parolis i.a. pri lingvoj kiel helpiloj al politika unueco kaj brile skizis komparon inter Dante kaj Zamenhof. Fakte Alighieri, sur baze de la toskana dialekto sed utiligante ankaŭ esprimojn kaj vortojn de aliaj italaj regionoj, realigis la lingvan unuecon de Italujo. Same Zamenhof, sur la komuna leksikologia bazo hindeŭropa, realigis lingvon neŭtralan kaj facilan, uzebla kiel dua esprimo kvazaŭ ponto inter popoloj kaj kiel efika rimedo por ekonomiaj, turismaj interŝanĝoj. La oratoro fermis sian brilan diradon, atenteme aŭskultata de la ĉeestantaro, per dua komparado, inter Lodoviko Zamenhof, la pola doktoro-lingvisto iniciatinto de Esperanto, solene memorigita de UNESCO kiel bonfaranto de la homaro en la centjaro de lia naskiĝo, kaj Albert Schweitzer, la doktoro-filantropo, Nobel-premiita.

===== MALFERMO DE ESPERANTO-KURSOJ EN BOLOGNA =====

Dimanĉon la 7-an de novembro en la Salono de la Florencanoj -Corte Galluzzi, 6- en Bologna okazis la ĉiujara malfermo de la Esperanto-kursoj per la enkonduka parolado de la eminenta Esperantisto kaj Latinisto Prof-ro Carlo Agostini, Ĝenerala Direktoro de Itala Instituto de Esperanto kiu temis: "Kion donas Esperanto al la Itala Lernejo".

Prof-ro Agostini substrekis i.a. la altan pedagogian valoron de Esperanto kiel helpilo en la lernado de aliaj lingvoj kaj fakoj en la mezgrada lernejo precipe nuntempe kiam tiu itala lernejo atendas ĝian radikalan reformon.

Sekvis la disdonado de la diplomoj al 35 lernantoj de la Esperanto-Kursoj okazintaj dum la pasinta jaro 1964-65 kaj la premiado de la plej meritplenaj. Prof-ino Dalla Valle en la nomo de la Lernejestrino Prof-ino Capponcelli donacis monsumon al la lernantoj de la E-kurso ĉe la lernejo "G. Reni".

Fine oni anoncis la nunjarajn kursojn de Esperanto inter kiuj tiun por fervojistoj kaj ĝiaj gefamilianoj. Tiu ĉi kurso okazas en la Profesia Lernejo de la Centra Stacidomo en Bologna ĉiujn mardojn kaj ĵaŭdojn de la 20,30 h. ĝis la 22 h. ekde la 11-a de Novembro.

===== N I G R A T U L A S =====

Ni havas la ĝojon anonci la naskiĝon de Donatella ZANINI, filino de nia membro Librotenisto Luciano kaj de Prof-ino Maria Grazia Sabelli. Al ili kaj al la avino, nia elstara pionirino, Wanda Sabelli, ni sendas varmajn bondezirojn kaj gratulojn.

Kun sama ĝojo ni anoncas la naskiĝon de Mario Taddia, filo de nia membro Vasco kaj de Angela Assiri. Al ili kune kun la avino Elena Taddia, ni sendas varmajn bondezirojn kaj gratulojn.

Al la du infanoj ni varme bondeziras kaj bonvenigas en nia E. familio.

===== D A N K O J N =====

Ĉar ni ne povas respondi persone al ĉiuj kiuj sendis kondolencojn pro la morto de nia Membro D-ro Ing. Otello NANNI, Delegito de U.E.A. en Bologna, ankaŭ en la nomo de lia familio, de I.F.E.A. kaj de la Bologna Esperanto-Grupo "Achille Tellini", ni esprimas niajn sincerajn dankojn.

La Redakcio de "ITALA FERVOJISTO"

===== A N O N C O =====

17-jara studento deziras korespondadon kun fervojistoj. Adreso: S-ro William OVERINGTON, 15 Grove Avenue, Honeybourne EVESHAM/Wocs, Anglio.

===== ESPERANTO EN LA RADIO - RADIO ROMA - ESPERANTO PAKO - DISSENDOJ JARO 1965-a =====

La dissendoj okazas de h.17,35 ĝis h.17,50 (M.E.T.). Ondlongoj m.31,33=Mc/S. 9,57 kaj m.41,24=Mc/s.7,27. Redaktoro: Luigi MINNAJA. DECEMBRO 1965-a

2025 dimanĉon la 5-an: La granda Itala helenisto Manara Valgimigli

2026 " " 12-an: Italaj regionoj: Kalabrio

2027 " " 19-an: Italaj pentristoj: Caravaggio

2027 " " 26-an: Leterkesto. Krome ĉiudimanĉe "Kuriero de Esperanto"